

81^a Hispana Kongreso de Esperanto

Sevilo, 12^{an}/15^{an} oktobro 2023



Kongreslibro

*Esperanto,
komprenemo inter popoloj*



FEDERACIÓN
ESPAÑOLA
DE ESPERANTO
HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

aeu

Andaluzia Esperanto - Unuiĝo
Asociación Andaluza de Esperanto



Loka Kongresa Komitato

Honora Prezidanto: Ángel Arquillos López

Prezidanto: José Roldán León

Sekretario: Antonio Romero Beltrán

Kasisto: Francisco Jesús Rodríguez Roldán

Voĉdonantoj: Lola García Perez

Eduardo Iriarte Gahete

Vicente Manzano Arrondo

Antonio Rodríguez Gasch

José María Rodríguez Hernández

M^a Dolores Torres Mateos


Kongreslibro de la 81-a Hispana Kongreso de Esperanto

Kunvokas: Hispana Esperanto-Federacio

Organizas: Sevilla Esperanto-Asocio

Kunlaboras: Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Saluto de la Prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio



Ángel Arquillos López

Mi, kiel prezidanto de HEF, deziras sukcesan kaj fruktodonan kongreson, mianome kaj ankaŭ nome de la federacio. Kvankam la unuaj referencoj pri esperanto en Andaluzio datiĝas fine de la 19-a jarcento, en Sevilo oni povas difini la jaron 1910 kiel la komencon de la internacia lingvo en nia urbo. Estis en 1911 kiam fondiĝis la Grupo Esperantista Sevillano. La 7-a Hispana Kongreso de Esperanto okazis en 1928 en ĉi tiu urbo. Partoprenis multaj eksterlandanoj, kiel Theophile Cart, prezidanto de la Akademio de Esperanto. Solenan malfermon prezidis la infanto Carlos, nome de la reĝo Alfonso la 13-a. Okazis diservo fare de pastro Mojado, tio malfermis

tradicion dum la hispanaj kongresoj. Ankaŭ okazis literatura festo, laŭ la kataluna kutimo de Floraj Ludoj.

Estas sciata, ke Sevilo belegas kaj kun ĝojo mi salutas ĉiujn esperantistojn de la urbo, kiuj kun plezuro ĉeestas aŭ partoprenas la eventon, kune kun homoj el la tuta hispana geografio kaj eĉ alilande. Kun emocio mi imagas specialan multkoloran feston kun flamenkaj kaj poeziaj momentoj kaj korbatoj dancantaj sur verda espera scenejo. Promenadi tra la urbo estas donaco por la vido kaj pro tio ni ne devas perdi eĉ unu minuton, ĉar belecon oni devas miri kun trankvilo por ĝui plene la grandiozajn parkojn, longajn aleojn, modernajn kaj klasikajn konstruaĵojn, ĉio sub la preskaŭ ĉiam blua ĉielo kaj la kareso de la aŭtuna vetero.

Oni scias, ke Sevilo havas la plej vastan urbocentron de la tuta Eŭropo, do mankos al ni tempo por vidi la tuton se ni ne promenas laŭlonge de la plej interesaj kvartaloj kun dekoj da monumentoj, palacoj, bonkvalitaj restoracioj, muzeoj, teatroj, grandaj magazenoj, kulturaj centroj ktp, ktp. Vi povos konstati tion, kion mi diras, ĉar simplaj vortoj ne sufiĉas por priskribi centprocente kion mi deziras esprimi.

La programo de la kongreso, de la komenco ĝis la fino, estas interesa, kun tre variaj programeroj, flamenkaj spektakloj, deklamado de poemoj, teatro ktp. Do, estu bonvenaj en Esperantujo, kies ĉefurbo ĉi tiu longa semajnfino troviĝas en la sudo de Eŭropo, en Andaluzio kaj ĝuste en Sevilo.



Prezidanto de la Loka Kongresa Komitato bonvenigas

Jam trifoje la sevila esperantistaro invitis la hispanajn samideanojn veni en nian urbon. La unua fojo okazis tiam, en 1928, kiam nia urbo ekfestis okaze de granda iberoamerika ekspozicio. Sevilo en tiuj jaroj pligrandiĝis, tiu deknaŭjarcenta urbo fariĝis moderna ĉefurbo, super kiu aviadiloj flugadis kaj ŝipoj navigadis en la transformita rivero Gvadalkiviro. Poste, en 1984, denove parolantoj de la internacia lingvo decidis renkontiĝi en Sevilo. Tiam, juna grupo de novaj esperantistoj decidis organizi kongreson en tiu Hispanio, kiu ankoraŭ ne apartenis oficiale al la Eŭropa Komunumo. La mondo kaj nia lando multe ŝanĝiĝis de tiuj jaroj. Ankaŭ nia lingvo mem.



José Roldán León

En tiuj jaroj, ĉefe en la komenco de la pasinta jarcento, nia movado revis pri baldaŭa akcepto de la tuta homaro favore al mirinda paca instrumento kreita de la doktoro Zamenhof. Nuntempe, ni eble ne estas tiel revemaj, kaj kvankam ni daŭre sekvas saman celon, tio estas la adopto de esperanto kiel internacia lingvo en la tuta mondo, ni scias, ke tiu dezirata revo nur okazos se ni lerte kapablas disvastigi esperanton en la socio. Do, estas necese montri, ke nia lingvo ekzistas.

Kaj jen la celo de niaj kongresoj, montri ke esperanto estas utila lingvo, ke ne temas pri malsukcesa projekto de tiuj revuloj

de la pasinta jarcento. Do, temas pri granda respondeco, ĉar cele la atingon de tiu projekto, ni unue devas atingi multenombrajn renkontiĝojn kie la internacia lingvo devas esti viva komunika rimedo.

Pro tio ni, la sevila esperantistaro, akceptis la proponon organizi ĉi-jare la 81-an Hispanan Kongreson de Esperanto, ĉar estos utile por nia movado en la sudo de Hispanio montri, ke esperanto vivas kaj esperantistoj abundas. Do, ĉiuj esperantistoj estas bonvenaj en Sevilon dum ĉi tiuj tagoj, jen bona momento por labori kaj kompreneble ankaŭ por ĝui belegan urbon.



En mia knaba aĝo, korteto en Sevilla,
maturaj or-citronoj en sun-banata horto.
En mia junco, dudek da jaroj en Castilla.
En mia vivo, faroj... Pri ili, muta vorto.

Kelkaj notoj pri la historio de Esperanto en la urbo Sevilo

La unua kurso de esperanto en Sevilo okazis en la jaro 1910, organizita de Trinidad Soriano kaj Casto Vilar. Soriano estis arkitekto kaj magistratano en la sevila urbodomo. Li lernis la internacian lingvon okaze de siaj universitataj studoj en Barcelono, tie li ankaŭ agadis en la sindikalisma movado. En la jaro 1909, li partoprenis en la 5-a Universala Kongreso de Esperanto en Barcelono, de tie li revenis en Sevilon kun la deziro disvastigi la lingvon, do, la plej efika maniero estus organizi kurson.

Cele la organizadon de tiu kurso, Trinidad Soriano kontaktis kun Casto Vilar. Li estis, en Sevilo, profesoro pri la franca lingvo, tamen li estis konsiderata en Hispanio kiel unu el la plej lertaj poliglotoj, kiam li loĝis en Madrido li instruis aron da lingvojn, inter ili: la angla, rusa, germana, araba ktp, li eĉ agadis en la volapuka movado, tie li kontaktis unuafoje kun la zamenhofa lingvo.

Trinidad Soriano subtenis efikajn kontaktojn kun la estraro de prestiĝa kultura asocio en Sevilo: la *Sociedad Económica de Amigos del País*, tio sendube faciligis la organizadon de kurso de la nova lingvo esperanto. Okaze de tiu unua kurso en la jaro 1910, Casto Vilar agis kiel profesoro.

Trinidad Soriano Hidalgo
1847 - 1920

Tiu unua kurso daŭriĝis kelkajn monatojn. Post ties okazigo, kaj kun la helpo de Trinidad Soriano, kelkaj lernantoj decidis fondi la unuan E-asocion en la urbo, la *Grupo Esperantista Sevillano*, tio okazis en la jaro 1911. Soriano estis la ĉefa motoro de la grupo, li faciligis la kontaktojn kun la municipaj aŭtoritatuloj, tiel oni atingis, de tempo

al tempo subvenciojn fare de la Sevila Urbodomo. Same, Soriano ebligis la okazigon de pliaj kursoj en la *Sociedad Económica de Amigos del País*. De tiu unua kurso restis nomoj memorataj en la sevila E-movado, ĉar plejmulto el illi restis fidelaj al la movado dum dekoj da jaroj, ekz. Karolo Martínez, Rafael Fiol, pastro Jerónimo de Córdoba, Joaquín Machuca ktp.



Lernantoj de la kursoj okazigitaj en la *Sociedad Económica de Amigos del País* en Sevilo, ne nur pri esperanto sed ankaŭ pri aliaj stud-objektoj. Trinidad Soriano aperas sidita kun bastono.

La movado en Sevilo plifortiĝis dum tiuj jaroj kaj tio, sendube, impulsis esperanton ankaŭ en la cetera Andaluzio. Tiel, en la jaro 1917 fondiĝis en Sevilo la Andaluzia Esperantista Federacio, kun la partopreno de samideanoj de Kadizo, Kordovo kaj Onubo.

Trinidad Soriano forpasis en la jaro 1920. En tiuj jaroj la esperantista grupo de Sevilo estis kvazaŭ granda familio kiu organizis, krom kursojn de la internacia lingvo, ekskursojn, festajn renkontiĝojn kaj ankaŭ grandan budon en la fama foiro de Sevilo. Post Soriano, estris la grupo la pastro Jerónimo de Córdoba, unu el la plej prestiĝaj latin-fakuloj en Hispanio. En la jaro 1924 venis en Sevilon, kiel vizitantoj, partoprenantoj en la tiujara hispana kongreso de Esperanto, okazanta en la najbara urbo Kordovo. Post tiu vizito la sevila grupo serioze konsideris la eblon organizi nacian

kongreson en la urbo. Favore al tio aldoniĝis la fakto, ke en la jaro 1929 estis pripensita la organizado en la urbo de internacia ekspozicio, pli ĝuste iberoamerika ekspozicio. Do, la grupo akceptis organizi E-kongreson kadre de tiu ekspozicio, tiel, en la jaro 1928 okazis en Sevilo la 7-a Hispana Kongreso de Esperanto, kun la partopreno de pli ol 200 homoj.



Partoprenantoj en la 7-a Hispana Kongreso de Esperanto
Sevilo 1928

Post tiu kongreso la agado de la grupo estis efika, tiel kursoj okazis ne nur en la *Sociedad Económica de Amigos del País*, sed ankaŭ en publikaj lernejoj, kulturaj organizoj, vegetaranaj asocioj, sindikatoj ktp. Tamen, ĉi ĉio haltiĝis en la jaro 1936, kiam la civila milito ekspluatis en Hispanio.

Dum la milito kelkaj membroj de la grupo estas murditaj, ne pro sia esperantismo, sed pro sia partopreno en politikaj, religiaj aŭ sindikataj movadoj. En aliaj urboj, oni murdis homojn kiuj rilatis aŭ iam aliĝis al sevila E-grupo, ĉefe pro sia rango kiel katolikaj pastroj. Do, oni povas aserti, ke ambaŭ kombatantaj frakcioj en Hispanio damnis la membrojn de la Sevila E-Grupo.

Post la civila milito, en la jaro 1947, kelkaj membroj de la grupo klopodis reorganizi la movadon en la urbo. La ĉefaj agantoj estis Rafael Fiol, oficiro de la hispana armeo, kaj Karolo Martínez, fervojisto. Neniu el ambaŭ estis suspektata agadi kontraŭ la tiutempa politika reĝimo en Hispanio. Do, la nova administracio akceptis la renaskiĝon de la Sevila Esperanto-Grupo.



Rafael Fiol Paredes




Carlos Martínez Fernández
Karolo

Bedaŭrinde, en tiuj jaroj neniu kurso de la lingvo okazis en Seviljo, malgraŭ tio, de tempo al tempo, internaciaj vizitantoj alvenis en la urbon, tiam Rafael Fiol agadis kiel la plej gastema ĉiĉerono. La okazigo de la Universala Kongreso de Esperanto en Madrido, en la jaro 1968, favoris la disvastigon de esperanto en la tuta lando. Unu el la partoprenantoj estis la sevila instruisto Felipe González del Pino. Komence de la 7-a jardeko li proponis al la edukaj aŭtoritatuloj en la urbo la organizadon de kurso de esperanto en publika lernejo. Tiu kurso, kaj aliaj poste, okazis, ĉeestis pli ol 40 homoj. Esperanto denove estis instruata lingvo en Seviljo.

En la jaro 1976, kelkaj monatoj post la morto de la diktadoro Franco, Antolin Colmenar havigis lokalon de li luita, cele la okazigon de kursoj de esperanto. Antolín estis eksteordinara homo, kies

historio nepre devas esti diskonigita. Lia vera nomo estis Tomás Caspe Cereijo, li estis madridano, dum la milito li kombatis favore al la respublika armeo, do, kiam la milito finiĝis li estis arestita kaj enkarcerigita. Post kelkaj jaroj en karceroj, li sukcesis fuĝi en Madrido. Tiam, li decidis alpreni la nomon de alia homo de li konata, verŝajne temis pri kunulo forpasinta dum la milito. Do, Tomás Caspe fariĝis Antolín Colmenar, li decidis foriri kiel eble plej malproksime de Madrido, tiel li venis en Sevilon. En nia urbo li laboris kiel lerta tegisto.

Antolín, kun la helpo de Felipe González del Pino, establis la Sevilan Akademion de Esperanto en la strato Sol 75. Tiu loko fariĝis la plej efika punkto por disvastigi la internacian lingvon ne nur en Sevilon, sed ankaŭ en la tuta Andaluzio. Ĉiuj jaroj okazis kursoj en la akademio kaj dank'al tio baldaŭ ekzistis sufiĉaj esperantistoj en la urbo por fondi la Seviljan Esperanto-Asocion. Poste, en la jaro 1982, kelkaj junuloj de la Akademio decidis organizi sin ene de la Sevilja Esperanta Junulara Organizo -SEJO-.



Tomás Caspe Cereijo aŭ
Antolín Colmenar Rivero

En la jaro 1984 la sevila esperantistaro organizis la 44-an Hispanan Kongreson de Esperanto, tiuokaze venis en Sevilon pli ol 150 homoj. Same, en tiu jaro, la sevila asocio, kune kun tiuj de Malago kaj Kordovo, ekigis la asocion Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. La ĉeesto kaj partopreno de sevilaĵ esperantistoj en renkontiĝoj, asocioj kaj projektoj, cele la disvastigon de la internacia lingvo, estis ofta. Konataj en la hispana movado fariĝis nomoj jenaj: Manuel Ramírez Cepeda, Luis Gilpérez Fraile, Alberto Franco Ramírez, Juan de Dios Montoto de Sarriá, Antonio Rodríguez Gasch, Rodrigo

Vaquera, Eduardo González Ordoñez, Paco Antúnez, Lola G. Perea ktp. Aliaj venis en Sevilon de aliaj urboj pro laboraj aferoj kaj ili baldaŭ integriĝis kaj kunlaboris kun la sevila asocio, ekz. la alakanta Manuel López Hernández aŭ la kordova José María Rodríguez.



Partoprenantoj en la 44-a Hispana Kongreso de Esperanto
Sevilo 1984

Bedaŭrinde la forpaso de Antolín Colmenar, vera animo kaj motoro de la grupo, kaŭzis la malaperon de la akademio, do, ankaŭ de la loko kie esperantistoj renkontiĝis kaj la lingvo estis instruata. Malgraŭ tio, kelkaj homoj renkontiĝis ĉiusemajne ĉe la ekologia societo *Ateneo Verde*, kvankam kursoj pri la lingvo ne okazis tie.

Komence de la nuna jarcento la movado ricevis novan impulson dank'al la alveno de novaj homoj, tiel en la jaro 2004 oficiale oni reorganizas la movadon en Sevilo ĉirkaŭ la Sevilja Esperanto Asocio, la prezidanto estis José Pavón Arreciado, iama lernanto de la akademio, tiam la renkontiĝoj de la asocio okazis ĉe la sindikato CNT. En tiu sama jaro la asocio akceptas proponon de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo organizi la kongreson en Sevilo por la jaro 2004.

Preskaŭ cent homoj ĉeestis tiun andaluzian kongreson, krome, la okazigo de tiu renkontiĝo en la municipa centro *Casa de las Sirenas* favoris la organizadon tie de kursoj de esperanto dum la sekvantaj jaroj. Ĉi tiu belega konstruaĵo en la centro de la urbo fariĝis la sidejo de la E-movado depost tiam.



10-a Andaluza Kongreso de Esperanto. Sevilo 2004

Nova andaluzia kongreso okazis en la jaro 2011, ties celo estis memori la unuan jarcenton de la fondiĝo de tiu grupo en la jaro 1911. Tiam, oni decidis verki historion de la E-movado en Sevilo, dank'al tiu projekto, hodiaŭ kadre de la 81-a Hispana Kongreso de Esperanto, estos prezentanta la libro *125 años de esperanto en Sevilla -125 jaroj da esperanto en Sevilo-*, kies aŭtoroj estas Juan de Dios Montoto, Manuel Ramírez, José María Rodríguez kaj Antonio Rodríguez.

La ĉefa agado de la sevila esperantistaro dum la lasta jardeko estis la kontaktoj kun la Universitato de Sevilo cele la organizadon de oficialaj kursoj de la lingvo. Tion ja oni atingis dank'al la kunlaboro de profesoroj de la Universitato, Vicente Manzano kaj Guillermo Molleda, kiuj sukcese organizis oficialan kurson kun akademia agnosko.



Eĉ la andaluzia televido informis en la jaro 2017 pri la agadoj en Sevilo cele la disvastigon de esperanto de Babelo Filmoj.

Sendube unu el la lastaj furoraĵoj en la disvastigo de la internacia lingvo naskiĝis en Sevilo. Temas pri la aventuroj de la pupo Uliso kaj la bovinoj. Fran Lobato kaj Pablo Bustos, kadre de Babelo Filmoj, produktis pup-desegnojn kiuj celas instrui esperanton ĉefe al infanoj. Do, la bovinoj instruantaj la numerojn en la internacia lingvo disvastiĝis en la tuta mondo, jam kun pli ol 130.000 fojoj viditaj.



*Krepuskas;
Vespero kliniĝis malsupren.
Seviljo sin ekbanas en fluo vesperora.
Alta la Ĥiraldo refoje sin aŭdigas.*

*Teo Jung
(origine verkita en esperanto)*

Programo de la 81-a Hispana Kongreso de Esperanto



Horo	Agado	Loko
10:00 11:55	Akceptado de partoprenantoj	Enirejo
12:00 12:55	Prezentado de la Kongreso <i>Antonio Rodríguez Gasch</i>	Ĉefsalono Zamenhof
16:30 18:00	Kunvenoj de asocioj <i>Hispana Esperanto-Federacio</i> <i>Sevila Esperanto-Asocio</i>	Salonoj: Trinidad Soriano Antolín Colmenar
16:30 18:00	Ateliero pri esperanto	Salono Rafael Fiol
18:00 18:45	Prezentado de la libro <i>125 años de esperanto en Sevilla</i> <i>José María Rodríguez Hernández</i>	Ĉefsalono Zamenhof
18:45 20:55	Festo omaĝe al la 112-a datreveno de la fondiĝo de la Grupo Esperantista de Sevilla	Enirejo

Libro kaj aŭtoroj sin prezentas


Kadre de la 10-a Andaluzia Kongreso de Esperanto, Sevilo 2004, grupo de antikvaj lernantoj de la Akademio de Esperanto de la andaluzia ĉefurbo decidis verki libron pri la historio de la lingvo kaj la E-movado en Sevilo. Unuavide la laboro ne ŝajnis tro peza, se paroli pri la unuaj jaroj de la movado (1911-1920), oni disponis pri la protokol-libroj de la tiama *Grupo Esperantista Sevillano*. Same la ĵurnaloj de tiu epoko abunde informis pri la agadoj de la esperantistaro. Kaj se temis pri la movado en Sevilo depost la 7-a jardeko, personaj memoroj estis la plej grava fundamento por tiu libro, pro la fakto, ke tiuj kiuj proponis la ideon verki libron ekagadis en la movado en tiuj jaroj.

Tamen, la afero malfaciliĝis ĉar, dum la esploradoj, aperis novaj nomoj, novaj faktoj, novaj konitaĵoj pri kiuj estis necese priesplori kiel eble plej profunde, se oni deziris verki sufiĉe legindan kaj diskonigindan libron. En la jaro 2011, kiam oni festis en Sevilo la unuan jarcenton de tiu unua Grupo de Esperanto, la projekto serioze ekmarŝis. Oni asignis konkretajn studojn al ĉiu respondeculo de la projekto, sed, malgraŭ tio la laboro prezentiĝis giganta, tagon post tago aperis novaj ĉefroluloj en la historio de la lingvo en Sevilo aŭ novaj konitaĵoj kiuj meritis esti diskonigitaj. Pro tio la laboro plilongiĝis.

Feliĉe, la okazigo de hispana kongreso de esperanto en Sevilo estis bona kialo por meti finan punkton al la laboro. Tiel, la kvar aŭtoroj de la verko: Juan de Dios Montoto de Sarriá, Manuel Ramírez Cepeda, José María Rodríguez Hernández kaj Antonio Rodríguez Gasch, akceligis la redaktadon de la libro, kiu aperas koincide kun ĉi tiu kongreso.

La libron vi povos akiri dum ĉi tiu evento, eĉ dum ĉi tiuj tagoj oni povos profiti specialan rabaton en la prezo kaj dum la festo,

organizota de Sevilla Esperanto-Asocio por prezenti la libron, vi povos peti al la aŭtoroj subskribi vian ekzempleron. Do, ne hezitu aĉeti la verkon *125 años de esperanto en Sevilla*, tra ties paĝoj vi privilegos ne-konatajn okazintaĵojn aŭ vi ekscios pri homoj kiuj rolis en la historio de la movado en Sevilo.



Eldonas: Círculo Rojo.

ISBN: 978-84-1199-081-3

Aperas la 12-an de oktobro 2023, kadre de la 81-a Hispana Kongreso de Esperanto en Sevilo.



En la restoracio:

- Sinjoro, en nia menuo vi trovos bongustaj legomoj, delica viando kaj freŝaj fiŝaĵoj.

- *Nu, mi vidas, ke vi ne havas akuzativojn.*

- Bone, mi vere ne scias, mi demandas al la kuiristo.



En la lingvo-ekzameno:

- Kvalifiku vian nivelon pri esperanto.

- *Nu, mi estas preskaŭ denaskulo.*

- Ni vidu. Formu frazon kun la numero 5.

- *God save the Kvin !*



Horo	Agado	Loko
10:00 11:30	Oficiala inaŭguro de la kongreso	Ĉefsalono Zamenhof
11:45 12:40	Filmoj en esperanto: <ul style="list-style-type: none"> • Kiel Tubaro (tuparo.aperu.net) helpas esperanton - <i>Pablo Busto</i>. • Pika pika esperanto - <i>Gabriela Manzano</i> 	Ĉefsalono Zamenhof
12:00 12:45	Ateliero pri esperanto	Salono Rafael Fiol
12:45 13:30	Prelego: Libera kulturo kaj liberaj programoj, ankaŭ en esperanto. <i>Jorge Maldonado</i>	Ĉefsalono Zamenhof
16:30 17:15	Prelego: Instruado de esperanto en la andaluza publika eduksistemo. <i>Antonio Fabián Jiménez</i>	Ĉefsalono Zamenhof
17:20 18:00	Teatro: "La akuzantivo aŭ la kazo pri la malklera tatuisto". <i>Ludas: Talenta Teatra Trupo</i>	Ĉefsalono Zamenhof
18:00 18:55	Prelego: Deveno de la lingvoj kaj de la lingva diverseco. <i>Philippe Planchon</i>	Ĉefsalono Zamenhof
19:00 19:20	Poezia deklamado.	Ĉefsalono Zamenhof
19:20 20:15	Prelego: Post duonjarcento... reen al la luno. La tuta spaca programo Artemiso. <i>Carlos Spinola</i>	Ĉefsalono Zamenhof
20:15 20:55	Prelego: Enkonduko al ĉinaj ideogramoj. <i>Juan García del Río</i>	Ĉefsalono Zamenhof

Prelegoj kaj prelegantoj



- **Kiel Tubaru** (tubaru.aperu.net) helpas esperanton.

Pablo Busto (naskiĝinta 1976). Li eklernis esperanton en 2004. Lia agado pri esperanto rilatas ĉefe al aŭdvideaĵoj (li kunlaboris por fari kelkajn kantojn, kaj kunlaboris ankaŭ en kelkaj dublaĵojn de mallongaj filmoj kaj parodioj). Nuntempe, lia esperanta agado temas ĉefe pri la interreta projekto *aperu.net*, kies unua subprojekto estas *tubaro.aperu.net*, prezentota

en interreto rilata al esperanto, en sama loko. Tubaro estas koncentrejo por videaĵoj, kie oni povas facile trovi esperantaĵojn, kaj aktive diskonigas ilin.

- **Pika Pika Esperanto**

Pika Pika Esperanto estas unu el la plej allogaj kanaloj en YouTube. Se vi estas komencanto, vi povas fortigi vian lingvoscion per la mallongaj videoj de Pika Pika Esperanto. Se vi jam flue parolas, simple ĝuu! Gabriela kaj ŝia patro, Viko, gvidas la kanalon kaj planas la enhavon senurĝe. Ili eksperimentas per diversaj stiloj: pupoj, komputilaj animacioj, desegnaĵoj, teatraĵoj, improvizado... ili estas esperantistoj!



Vi povas spekti la videojn kaj sekvi la kanalon ĉe:

<https://www.youtube.com/@pikapika-eo>

- **Libera kulturo kaj liberaj programoj, ankaŭ en esperanto.**

Jorge Maldonado, programisto kaj tradukisto, kiu administras retejon pri liberaj programoj kaj kulturo.

Kio estas rajtcedo? Kial liberaj programoj gravas? En ĉi tiu prelego la aŭtoro klarigos tiujn konceptojn kaj li montros kelkajn liberajn programojn kaj verkojn, kiuj disponeblas en Esperanto kaj ili tre utilas kaj interesas.



- **Instruado de esperanto en la andaluza publika eduksistemo.**

A. Fabián Jiménez. Instruisto de Geografio, Historio kaj Esperanto. Dank'al eŭropa programo Erasmus+, li estis la unua hispana instruisto kiu enirigis la lernadon de Esperanto kiel oficialan lernofakon en Hispanio per la projekto "Esperanto Komunikado" en la mezlernejo IES Almenara de Vélez-Málaga, en la jaro 2019. Ekde tiam li klopodas subteni, jaron post jaro, la instruadon de ĉi tiu elektebla lernofako, kies ekzisto dependas de la libera elekto de la lernantaro. Li kunlaboras kun aliaj eŭropaj instruistoj de Esperanto, kaj li instigas la kreadon de esperanta reto de instruistoj kiuj proponas lernadon de la lingvo en siaj lernejoj.

Ĉu estus eble enirigi la lerno-fakon esperanton ene de la andaluza publika eduksistemo? A. Fabián Jiménez vere scias pri tio. Antaŭ kelkaj jaroj li ekinstruis la internacian lingvon al kelkaj gelernantoj kaj aliaj profesoroj dum la lerno-paŭzoj. Tamen, la afero serioziĝis kaj antaŭ du jaroj li proponis oficiale instrui stud-objekton pri la

temo “Esperanto kaj Eŭropaj Valoroj”. Li sukcesis, la nova lerno-fako altiris la atenton de la lernantaro de lia mezgrada lernejo. La projekto devas esti prezentita kaj aprobita de la lerno-komunumo jaron post jaro, sed li denove sukcesis ĉar dum la kuranta lerno-jaro 2023/2024, li ree instruos esperanton en sia gimnazio en Vélez-Málaga. Li rakontos al ni pri siaj spertoj ĉefe rilate la ellaboradon kaj proponon de la projekto.

- ***Deveno de la lingvoj kaj de la lingva diverseco.***



Philippe Planchon estas asocia profesoro (*maître de conférences*) en la Universitato de Tours, kie li estas membro de la esplor-teamo VETD (Variado: Enunciativo, Tipologio, Diakronio) en la Liĝeria Lingvistika Laboratorio (LLL, UMR 7270, CNRS). Liaj esplor-kampoj estas la diverseco kaj la deveno de la lingvoj, la interlingvistiko, kaj la konstruado de la vorto-signifoj laŭ enunciativa perspektivo en la franca lingvo kaj en Esperanto.

La prelego esploros la demandon pri la deveno de la lingvoj kaj de la lingva diverseco. Fakte, ekzistas multe da lingvoj en la mondo, kaj ili estas tre diversaj. Tamen, ĉu estas komunaj trajtoj inter la lingvoj? Ĉu tiuj trajtoj klariĝas pro komuna deveno? De kie devenas la lingvoj? Por respondi al tiu demando, ni trarigardos la historion mem de tiu demando, kaj ni uzos diversajn vidpunktojn por klarigi tiun temon.

• ***Post duonjarcento...reen al la luno. La tuta spaca programo Artemiso.***

Carlos Spinola estas hispana fizikisto kaj doktoro inĝeniero pri Komputikaj Sciencoj. Li estis profesoro de la Universitato de Malago kaj kunfondinto de la Informadikaj Studoj en tiu universitato. Krom instruado, li estris esplorajn projektojn kune kun industriaj entreprenoj. Nuntempe li estas honora profesoro en la Elektronika Sekcio de la Malaga Universitato.



Ekde sia universitata studenta periodo pri fiziko li ĉiam interesiĝas pri astronomio kaj spaca esplorado. Li estas membro de la Planeda Societo *-Planetary Society-* fondita de Carl Sagan kaj de la Marsa Societo *-Mars Society-*. Li esperantiĝis en 2013 kaj depost tiam li multe vojaĝis kaj prelegis en diversaj kongresoj. Li estis prezidanto de la Organiza Komitato de la 78-a Hispana Kongreso de Esperanto.

La programo Artemiso estas robota kaj homa Luno-esplora programo, gvidita de la usona agentejo NASA, kune kun la eŭropa ESA, la japana JAXA kaj la kanada CSA. Se sukcesa, la Artemis-programo reestablos homan ĉeeston sur la Luno por la unua fojo ekde la misio Apollo 17 en 1972. Laŭ la programo decidita en 2021, Artemiso 3, lanĉota en 2025, estos la unua misio kiu alportos gean skipon da du astronautoj al la Luno por ses kaj duon-taga restado.

• **Enkonduko al ĉinaj ideogramoj.**



Juan García del Río naskiĝis en Malago (Hispanio) en 1965. Profesie, li estas funkciulo de la hispana ministerio pri Justico. Li licenciĝis pri juro kaj studas psikologion (kaj universitate kaj amatore). Li esperantiĝis en 2004, kvankam li ekagadis en la movado kelkajn jarojn poste.

Li verkas artikolojn en esperanto, kiujn li enhavigas en sian blogon, sub la nomo *Esperantaj Pripensoj*. Multaj el tiuj artikoloj estas ankaŭ publikigitaj surpapere en diversaj revuoj, ĉefe hispanaj, sed ankaŭ de aliaj landoj.

Dum pasintaj jaroj, li jam prelegis pri diversaj temoj (psikologio, lingvistiko ktp) en kelkaj esperanto-kongresoj.

La celo de ĉi tiu prelego estas enkonduki la bazojn de la ĉina skribsistemo al homoj kiuj, komence, ne tro interesiĝas pri tio. Post baza enkonduko pri dialektoj kaj tonoj -kaj pri azia interkulturaj similecoj-, oni montros simplajn kaj kuriozajn ekzemplojn pri ideogramoj, facile kompreneblaj de ĉiuj ĉeestantoj.



Artaj Spektakloj

- **TEATRO:** “*LA AKUZANTIVO AŬ LA KAZO PRI LA MALKLERA TATUISTO*”.

Ĉu la uzo -aŭ neuzo- de akuzativo povus okazigi akuzon dum jura proceso? Lukas Toczki kaj la Talenta Teatra Trupo montros al ni, ke ofte la realo povas esti eĉ pli kruela ol tio supozita. Do, prizorgu vian uzon de la akuzativo, ĉar via korpa integreco estas en risko se vi ne uzas tiun gramatikaĵon sufiĉe bone. Vi jam estas avertita!

- **POEZIA DEKLAMADO.**

Akompanita de sitaro, Ana Manero kaj Ángel Arquillos deklamos poeziaron en esperanto.



Seviljana kaprico:

La strateto estas vundo
kalke-lume kuracita...
ludas kun rozuj' la suno
en fenestro florvestita.

Fernando Villalón
(trad. Antonio Marco Botella)



Horo	Agado	Loko
10:00	Ateliero pri esperanto	Salono Rafael Fiol
10:00 13:55	Vizito al la Belarta Muzeo	
17:00 17:30	Teatro: "La Gazetara Konferenco" <i>Ludas: Talenta Teatra Trupo</i>	Ĉefsalono Zamenhof
17:00 18:00	Ateliero pri esperanto	Salono Rafael Fiol
17:30 18:15	Prelego: Minimunismo bonas <i>Juan García del Río</i>	Ĉefsalono Zamenhof
18:15 19:00	Prelego: La bibliotekoj tra la historio <i>Ana Manero</i>	Ĉefsalono Zamenhof
19:30 20:30	Pupteatro <i>Aleksandra Lopatina</i>	Ĉefsalono Zamenhof
20:30 20:55	Grupo de kastanjeto-ludistoj	Ĉefsalono Zamenhof

Belarta Muzeo de Sevilo

En la jaro 1841 oni inaŭguris en la eksa monaĥejo La Merced la tiel nomata: Muzeo de Pentrarto de Sevilo, nuntempa Belarta Muzeo, kiu estas konsiderata la dua plej grava muzeo en Hispanio, post tiu de El Prado en Madrido. Ene de ĝi troviĝas la plej gravaj verkoj de la barokaj sevilaj pentristoj, tio estas, de Zurbarán, Murillo kaj Valdés Leal.



Ne nur la pentraĵoj montrataj sed ankaŭ la konstruaĵo mem estas vera juvelo. Kiel dirite, temas pri eksa monaĥejo, do eblas trovi ene kelkajn klostrojn kaj kortojn, kie abundas buntaj azuleĥoj. Rilate la pentraĵojn, la plejmulto el ili devenas el antikvaj monaĥejoj alipropigitaj de la ŝtato dum la 19-a jarcento. Pro tio, preskaŭ ĉiuj pentraĵoj pritraktas religiajn temojn. La plej antikvaj verkoj devenas de la 15-a jarcento, ili ĉefe estas skulptaĵoj de artistoj kiuj kunlaboris en la konstruo de la ĉefaltaro de la katedralo.

En la 16-a jarcento la urbo Sevilo fariĝis la komerca ĉefurbo de Hispanio, dank'al la ŝipoj kiuj komercis kun la ĵus eltrovita amerika kontinento. Tiam, venis en la urbon flandraj kaj italaj artistoj kiuj

plibeligis palacojn kaj religiajn konstruaĵojn. En la muzeo estas eble trovi tiatempajn pentraĵojn de Alejo Fernández kaj skulptaĵojn de Pietro Torrigiano, disĉiplo de Mikelanĝelo, same de la fama El Greco.



Portreto de Jorge Manuel Theotocópuli de El Greco (1597)

De la 16-a jarcento estas eble vidi pentraĵojn de sevilaj artistoj, komenciĝas nun la manierisma periodo kun artistoj kiel Luis de Vargas, Alonso Vázquez kaj Francisco Pacheco. Ĉi tiu lasta estas konsiderata kiel la unua naturalisma pentristo en Sevilo, li ankaŭ estis la mastro kaj bopatro de Diego Velázquez, sendube la plej fama sevila pentristo. Komenciĝis tuj poste la baroka stilo kaj en la muzeo estas troveblaj verkoj de Murillo kaj Zurbarán, tiutempe Sevilo ne nur estis la komerca ĉefurbo de Hispanio, sed ankaŭ la lulilo de la plej eminentaj artistoj. Barok-stilaj estas ankaŭ la skulptaĵoj de la granada Pedro de Mena.

La ĉambro 8-a estas dediĉita al la pentristo Francisco de Zurbarán, kune kun Diego de Velázquez, la plej grava pentristo en la tiel nomata Ora Jarcento de la hispana arto. Lia enkadriĝas perfekte en la baroka arto. Li estis unu el la preferataj pentristoj de la katolika eklezio en Sevilo por ornamu preĝejojn kaj monaĥejojn -li estas konata kiel la pentristo de la kartuzianoj-, feliĉe multajn el tiuj verkoj nun estas eble vidi en la sevila muzeo.



Sankta Hugo en la refektorio de la kartuzianoj de Zurbarán (1655)

Elstarindas ankaŭ en la sevila belarta muzeo la ĉambroj dediĉitaj al la 19-a jarcento. En tiu jarcento la pentristoj ne reprezentasjreligiajn aferojn, sed portretojn kaj pejzaĝojn. La plej belaj portretoj apartenas al la romantika epoko, troviĝas en la sevila muzeo la fama portreto de la poeto Gustavo Adolfo Bécquer, farita de lia frato Valeriano.



Portreto de
Gustavo Adolfo Bécquer,
de Valeriano Bécquer
(1862)

En tiu jarcento andaluziaj pejzaĝoj ankaŭ estas reprezentataj. La pentristo Manuel Barrón aperigas ciganinojn kaj banditojn ĉe la montaro de la vilaĝo Arundo. Dum ĉi tiu epoko ankaŭ videblas pentraĵoj pri historiaj epizodoj, tiel la konkero de Malago fare de la Katolikaj Gereĝoj.

Kiel kuriozaĵo indas diri, ke unu el la portretoj de la ĉambro dediĉita al la 20-a jarcento reprezentas la doktoron Pedro Ruiz Prieto, la aŭtoro de la verko estas la sevila pentristo Gonzalo Bilbao. D-ro Ruiz Prieto estis unu el la pioniroj de la esperantomovado en Sevilo.



Prelegoj kaj prelegantoj

- **Minimunismo bonas.**

Informoj pri la preleganto, Juan García del Río, jam aperas sur la paĝo 24-a. Enkonduke, oni priparolos la bazojn de la homaj konduto kaj penso, navigante tra biologiaj kaj psikologiaj konceptoj. Poste oni alvenos al la ideo -surbaze de mia persona sperto- ke “ju malpli oni bezonas, des pli feliĉe oni vivos”. Oni analizos la manifestiĝojn de minimumismaj sintenoj en nia ĉiutaga vivo kaj tra la historio de homaj kulturoj.



- **La bibliotekoj tra la historio.**

Ana Manero, Madrido 1963. Bibliotekisto. Ŝi laboris en la Nacia Biblioteko de Hispanio ĝis antaŭnelonga emeritiĝo. Esperantisto de 1989. Prizorganto de la Biblioteko Juan Regulo Pérez de Hispana Esperanto-Federacio. Kadre de ŝia biblioteka agado, ŝi kunordigas la projekton Bitoteko kune kun Miguel Ángel Sancho. Krome, ŝi redaktas dulingve la bibliotekan retejon kaj mastrumas la bibliotekan retkatalogon. En 2015 al ŝi estis aljuĝita Diplomo pri Elstara Agado fare de la estraro de UEA. En 2017, la Premio Ada

Figuera-Sikorska, kadre de la Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo.

Fulma vojaĝo tra la historio de la bibliotekoj: konservejoj de la bibliografia heredaĵo; lokoj, kiuj plifaciligas la scian kaj esploran antaŭeniron; centroj de kultura agado, de libertempo kaj de socia integriĝo. Nemalhaveblaj servoj, pri kiu neniu konscia socio povas rezigni.

Artaj Spektakloj

• **TEATRO: “LA GAZETARA KONFERENCO”.**

Rakontas la biografoj de L. Zamenhof, ke antaŭ la definitiva versio de la lingvo internacia kreita de la pola doktoro ekzistis alia, kiuj fakuloj nomas “Praesperanton”. Laŭdire, kiam Zamenhof eniris en la universitaton, Mordechai Zamenhof, patro de la aŭtoro, decidis detruĝi -forbruligita- tiun praan version de esperanto.

Tamen, ĉu vere okazis tio? Lukas Toczki kaj la Talenta Teatra Trupo prezentas alian *eblan* version de tiu historio, kie Markus Silbernik -bopatro de Zamenhof- ĉefrolas.

• **PUPTEATRO.**

Nia rusa samideanino Aleksandra Lopatina reprezentos tri jenajn pupteatrajn verkojn:

- *Falu sep fojojn, leviĝu ok fojojn.*
- 31 • *Malvarmaj kaj varmaj vortoj.*
- *Kiu estas la plej forta.*

• **GRUPO DE KASTANJET-LUDISTOJ.**

Sevila grupo de kastanjet-ludistoj de María José Sánchez Falcón akompanos per siaj kastanjetoj muzikaĵojn. Kastanjeto estas ligna klakilo, ronda kaj konkava, kiun oni ligas duope al la fingroj por sonigi ilin, frapante ilian konkavan flankon unu kontraŭ alia.





Horo	Agado	Loko
10:00 10:30	Teatro: "La pomo de Adam." <i>Ludas: Talenta Teatra Trupo</i>	Ĉefsalono Zamenhof
10:30 12:00	Aŭkcio <i>Tonyo del Barrio</i>	Ĉefsalono Zamenhof
12:00 12:45	Prelego: Komprenemo inter popoloj. <i>Duncan Charters</i>	Ĉefsalono Zamenhof
12:45 13:30	Oficiala fermo de la kongreso	Ĉefsalono Zamenhof



Cipresoj de l' Albajcino,
belaj mirtoj de l' Alhambro,
cedroj de l' Generalifo,
arom' belo, suko, ĉarmo,
la ĝoj-bruo de Sevilo,
la graveco de Granado,
la fajnaj bedar-jasmenoj,
geranioj de Triano...

Federico García Lorca
(Trad. Antonio Marco Botella)

Prelegoj kaj prelegantoj

Duncan Charters, brito, doktoro pri lingvoj, li laboris kiel profesoro de la hispana lingvo en kelkaj usonaj universitatoj. Ekde la jaro 2019 li estas prezidanto de Universala Esperanto-Asocio.

La rolo de esperanto kiel rimedo por ebligi komprenemon inter popoloj estas la ĉefa temo de la kongreso, kaj pro tio, la centra prelego de la renkontiĝo pritraktos ĉi tiun temon. Antaŭ deko da jaroj, Ban Ki Moon, tiama ĝenerala sekretario de Unuiĝintaj Nacioj, deklaris ke la popoloj devas interkompreniĝi kaj

nur tiel la homaro povos detrui la barilojn kiuj malebligas progresi. La internacia komunumo nepre devas ekkonscii pri tio, ĉar la reciproka ne-komprenado ne faciligas la solidarecon inter nacioj kaj popoloj kaj tio, sendube, damaĝas la pacon kaj la sekuran disvolviĝon en la tuta mondo.

La lingvo esperanto naskiĝis kiel neŭtrala komunikilo por la homoj, *ĉi tie renkontiĝas ne ruso kun polo, nek anglo kun franco, sed homoj kun homoj*, diris Zamenhof antaŭ pli ol cent jaroj, al tiu utilo kiel lingvo por individuoj, oni povas aldoni ties valoron kiel ilo por faciligi la komprenemon inter popoloj.



Artaj Spektakloj

- **TEATRO: "LA POMO DE ADAM".**

Ĉu ni devas fidi komplete pri tio rakontita de la Biblio? Ĉu vere la Kreado okazis tiel? Ĉu prave Eva pensis, ke pomoj estis ne-mangeblaj fruktoj? Ĉu vere Adam donis nomon al ĉiuj bestoj?

Lukas Toczki kaj la Talenta Teatra Trupo prezentas alian version de ĉio rakontita en la Genezo, kiu sendube povus esti realo... aŭ ne.

- **AŬKCIO** fare de **Toño del Barrio**.



La celo de ĉi tiu aŭkcio estas helpi al la kongreso kaj ankaŭ pasigi bonan tempon.

Vi mem povas alporti materialon por kontribui al ĝi. Kunprenu aĵojn kiuj povas esti interesaj por aliaj, ĉefe (sed ne nepre) kun ia rilato al Esperanto. Kontaktu kun mi (Toño del Barrio) dum la kongreso, sed iom antaŭ la aŭkcio mem, por organizi ĝin.

Ah, kaj ne forgesu kunporti plenan monujon, ankaŭ!



Pontoj, bildoj de Sevilo.

Bildoj uzataj por diskonigi nian kongreson reprezentas pontojn. Verŝajne ponto ebligas transiri de unu loko en alian, temas, do, pri konstruaĵo kiu kapablas komuniki homojn de unu kaj alia bordo, ĉu tio ne similas al la celo de nia lingvo kaj movado? Jes, ties celo estas faciligi komunikadon kaj komprenemon inter homoj kaj popoloj. Do, ni uzis pontojn troviĝantajn en nia ĉi-jara kongresurbo por esprimi la celojn de nia lingvo.



En la historio de Sevilo estas eble trovi du pintajn momentojn, kiuj rekte rilatas al la tutmonda diskonigo de nia urbo. Temas pri eventoj okazintaj en la jaroj 1929 kaj 1992. En ambaŭ momentoj okazis du internaciaj ekspozicioj.

Tiu de la jaro 1929 verdire estis iberoamerika ekspozicio. Tiam, nia urbo kreskis, oni starigis belegajn konstruaĵojn ĉirkaŭ la impona parko María Luisa, kiu fariĝis verda pulmono de la urbo. Inter ĉiuj konstruaĵoj, rimarkinda estas la Placo Hispanio, dezajnita de la arkitekto Aníbal González, kun lageto ornamita de kelkaj pontoj. Do, ni profitis tiun bildon por la afiŝo de la kongreso.

Kiel kuriozaĵo ni povas diri, ke la placo, fin-konstruita en la jaro 1929, ĝi utilis nur unu jaro antaŭ kiel loko por la inaŭguro de la 7-a Hispana Kongreso de Esperanto, okazinta en Sevilo en novembro de 1928.

Alia internacia ekspozicio okazinta en Sevilo estis tiu de la jaro 1992. Verdire temis pri Universala Ekspozicio, organizita sub la temo "Erao de Eltrovoj", ĝi koincidis kun la 5-a jarcento de la vojaĝo de Kristoforo Kolombo en Amerikon.

Samtempe al la konstruo de naciaj pavilonoj, en la urbo oni konstruis kelkajn pontojn por trapasi la riveron Gvadalkiviron, la granda rivero de Andaluzio kiu trakuras Sevilon. Unu el tiuj pontoj estis tiu dezajnita de la arkitekto Santiago Calatrava, konata kiel "Ponto de la Alamillo". La 140 metroj de la ponto videblas de ĉiu punkto de la urbo, ĝi similas al raketo kiu celas atingi la universon.



Ĉar temas pri belega kaj impona ponto, ni deziris uzi ĉi tiun bildon kiel simbolon de la kongreso. Denove ponto subtenanta platformon, kiu ebligas iri de unu loko en alian, same kiel esperanto.

Mi  **Sevilon**

Memore al ne-forgesebla amiko.

Kelkaj tagoj antaŭ la komenco de la kongreso venis malfeliĉa novaĵo: Augusto Casquero de la Cruz, unu el la plej eminentaj movadanoj en Hispanio, forpasis la pasintan 19-an de septembro. Li naskiĝis en Plasencia (Kacereso) en la jaro 1945, li estis oficiro de la armeo kaj licenciulo pri Edukado, en la branĉo de speciala edukado. De 1987 li laboris kiel logopedo.



Augusto Casquero de la Cruz
(1945 - 2023)

Li lernis esperanton en la jaro 1969, poste li instruis la lingvon en Madrido kaj en Valencio, sed ankaŭ en aliaj landoj, kiel Slovakio, Pollando, Usono kaj eĉ en Ĉinio. En Valencio li instruis esperanton dum ses jaroj en la fakultato pri Filologio. En la movado li okupis diversajn postenojn, inter ili prezidanto de Madrida Esperanto-Liceo, same en la Valencia Esperanto-Federacio, de la Hispana Esperanto-Federacio, inter 2005 kaj 2008, kaj okaze de la Universala Kongreso de Esperanto en Valencio (1993) li estis prezidanto de la Loka Kongresa Komitato.

Li verkis dudekon da eseoj pri esperanto, pedagogio kaj logopedio, kaj centojn da artikoloj en la internacia lingvo, li ankaŭ estis ofta kunlaboranto en la revuo *Monato*. En la jaro 2004 li ricevis la Premion Ada Figuera-Sikorska, pro sia agado en la esperanto-movado.

Kiel kuriozaĵo ni diru, ke li estis asistanto en la filmo *El coche de pedales* (2004), pro la fakto ke unu el la ĉefroluloj laboras kiel profesoro de esperanto. Li instruis iomete prononcadon de la lingvo kaj skribis la tekstojn aperantajn en tiu filmo en la internacia lingvo.

NEFORGESEBLA AUGUSTO, PACE RIPOZU !

HORIZONTALALE

- A. (*Plurale kaj en akuzativo*) anoj de la urbo kie okazas la 81-a Hispana Kongreso de Esperanto.
- B. (*Akuzative*) punkto, de kiu io evoluis kaj disvolviĝis. ■ Vokalo.
- C. Salo aŭ organika derivaĵo de cianata acido. ■ (*Inverse*) pronomo uzata por nomi la alparolatojn.
- Ĉ. Eco de tio aŭ tiu, kiu estas inda. ■ (*Adjektive*) rilata al la malluma regiono inter nia tero kaj la subtera Hadeso.
- D. Litero trovebla sur la hispanaj aŭtomobiloj. ■ (*Plurale*) loko aranĝita por ebligi al la viroj eligi ekskrementan likvon.
- E. Ĝiri. ■ (*Inverse*) interjekcio, esprimanta ĝenerale la vivecon de sento. ■ Vokalo.
- F. Sufikso prezentanta la plenumanton de procezo dum ties plenumiĝo. ■ Virin' . ■ (*Sen la lasta vokalo*) sovaĝa porko.
- G. (*Sen la lasta vokalo*) Grupo de herboj el mezvarmaj Eŭropo kaj Azio el la familio orkidacoj. ■ (*Sen la lasta vokalo*) malalta muro super la lasta plafono, staranta antaŭ tegmento.
- Ĝ. Sufikso esprimanta pasivon por ankoraŭ ne okazinta procezo. ■ Grado en kiu acido ĉeestas.
- H. (*Akuzative*) la plej supra tavolo de la interna atmosfero.

VERTIKALE

1. Membroj de daŭra kuniĝo de pli-malpli multaj personoj sub komuna regularo, por atingi ian ajn komunan celon.
2. (*Sen la lasta vokalo*) antikva nomo de Irlando. ■ Speco de unujara herbo kultivata por spicaj junaj folioj kaj ŝosoj uzataj por saŭcoj.
3. Alta ponto konstruita super rivero aŭ valo por porti ŝoseon aŭ fervojon. ■ Akuzativa konsonanto.
4. Ne voli scii. ■ La nedifinebla principo imanenta en la universo kaj ĝin movanta, karakterizata de la alterno de jino kaj jango.
5. De li. ■ Infinitiva vokalo. ■ (*Inverse*) Havi precize certan ideon pri io.
6. (*Akuzative*) Palpa organo troviĝanta sur la kapo de artropodoj kaj aliaj bestoj. ■ (*Inverse*) interjekcio esprimanta malestimon kaj abomenon.
7. (*Inverse kaj en akuzativo*) Ĉefa persono de historio, aventuro, rakonto aŭ teatraĵo. ■ Memstare uzata morfemo, signifanta daŭron, pluigadon.
8. Sufikso, almetiĝanta al numeraloj kaj uzata por derivi vortojn, indikantajn unu el la egalaj partoj de tuto. ■ (*Inverse*) Prepozicio, kies senco estas nedefinita. ■ (*Inverse*) Rilata al aranĝo de interkruciĝantaj linioj kun interspacoj, iel simila al tia teksaĵo.

9. Postfina morfemo, markanta la pluralon. ■ (Inverse kaj sen la lasta vokalo) Longa kaj ofte larĝa japana zono el teksaĵo, uzata ĉe kimono. ■ Speco de torto el salita pasto, kutime garnita per tavolo de dispecigitaj senŝeligitaj tomatoj kaj fromaĝo, kun aldono de aliaj ingrediencoj laŭ la persona ŝato.

10. (Akuzative) Granda urbo de Usono.

1 2 3 4 5 6 7 8 9 10

A

B

C

Ĉ

D

E

F


G

Ĝ

H


								■	
							■		
				■					
	■								
				■			■	■	
			■			■			
					■				
		■							





Regno en Ameriko.

Solvo: _____



Ĉi tio ne povas esti aĉetata.

Solvo: _____



Aliĝintoj al la 81a Hispana Kongreso de Esperanto - Sevilo 2023

1. José Roldán León	Sevilla	Hispanio.
2. Mariló Vinuesa Salgueiro	Sevilla	Hispanio.
3. Yuro Jung		Sud-Koreio.
4. Gabriela Manzano Paloma	Sevilla	Hispanio.
5. Vicente Manzano-Arrondo	Sevilla	Hispanio.
6. Eduardo Iriarte Gahete	Dos Hermanas	Hispanio.
7. Cristina Pérez Baeza	Córdoba	Hispanio.
8. José M ^a Rodríguez Hernández	Córdoba	Hispanio.
9. Ricardo Biurrún González	Madrid	Hispanio.
10. Juan García del Río Guerrero	Málaga	Hispanio.
11. Manuel Parra Benito	Madrid	Hispanio.
12. Ana M ^a Manero García	Madrid	Hispanio.
13. Ángel Arquillos López	Málaga	Hispanio.
14. Mariló Torres Mateos	Málaga	Hispanio.
15. M ^a Dolores Pérez Pérez	Guardamar del Segura	Hispanio.
16. Xavier Detournay	Saint-Joseph	Reunio.
17. M ^a Luisa de Lamo Blázquez	Albacete	Hispanio.
18. Antonio Gutiérrez Gil	Marbella	Hispanio.
19. Ana Romero Ruiz	Marbella	Hispanio.
20. Guadalupe Sanz Bueno	Madrid	Hispanio.
21. Carmen Suárez Fernández-Cid	Madrid	Hispanio.
22. Angelita Sanz Mayor	Madrid	Hispanio.
23. Francisco Jesús Rodríguez Roldán	Sevilla	Hispanio.
24. Antonio Romero Beltrán	Sevilla	Hispanio.
25. Juan Diego Díaz Bautista	Ronda	Hispanio.
26. Lourdes García Valle	Aguilar de la Ftra.	Hispanio.
27. Philippe Planchon	Tours	Francio.
28. François Giovanetti	Saint Maixent	Francio.
29. M ^a Dolores García Perea	Sevilla	Hispanio.
30. Luis Genaro Toral López	Sevilla	Hispanio.
31. Luz Barranquero Gandul	Sevilla	Hispanio.
32. Ignacio Javiero Cancelo de Juan	León	Hispanio.
33. Lorenzo Noguero Sarasa	Zaragoza	Hispanio.
34. Eunice Alberto Moysés	Zaragoza	Hispanio.
35. <i>Ne deziras aperi en listo.</i>		
36. <i>Ne deziras aperi en listo.</i>		
37. María Iciar Arteché Urrutia	Bilbao	Hispanio.
38. Faustino Castaño Vallina	Gijón	Hispanio.

39. M ^a Ángeles García González	Gijón	Hispanio.
40. Rafael Moncalián García	Maliaño	Hispanio.
41. Félix Manuel Jiménez Lobo	Madrid	Hispanio.
42. Matilde Montero Sánchez	Madrid	Hispanio.
43. Luis Montero Jiménez	Madrid	Hispanio.
44. Susanna Baghdasaryan	Yerevan	Armenio.
45. Pedro Martínez Talaván	Madrid	Hispanio.
46. Elsa Martínez Castro	Madrid	Hispanio.
47. Boguslaw Ubik-Perski	Weil am Rhein	Germanio.
48. Katarzyna Ubik-Perska	Weil am Rhein	Germanio.
49. Miguel Gutiérrez	Muriedas	Hispanio.
50. Pedro Ullate	Muriedas	Hispanio.
51. Antonio Rodríguez Gasch	Sevilla	Hispanio.
52. Carlo Minnaja	Padova	Italio.
53. Jesús Miguel García Iturrioz	Portugalete	Hispanio.
54. Guadalupe Casilla Mimblero	Portugalete	Hispanio.
55. Laura Gilda Paccagnella	Padova	Italio.
56. José Salguero	Don Benito	Hispanio.
57. Pere Navarro Rosinés	Barcelona	Hispanio.
58. Jorge Maldonado Ventura	Granada	Hispanio.
59. Javier Alcalde Villacampa	Barcelona	Hispanio.
60. Alberto Granados Orcero	Teruel	Hispanio.
61. Francisco Julián Herrero Armijo	Teruel	Hispanio.
62. Alberto Corral Martín	Santander	Hispanio.
63. Rosa del Mar Santiago Mancebo	Obregón	Hispanio.
64. Pako Balibrea	León	Hispanio.
65. Carlos Spínola	Málaga	Hispanio.
66. Francisco López	Bilbao	Hispanio.
67. Rodica Todor	Brasov	Rumanio.
68. Francisco Javier Martín Gómez	Teruel	Hispanio.
69. Fernando Estepa Gómez	Sevilla	Hispanio.
70. Pablo Busto	Sevilla	Hispanio.
71. María Luisa Soriano González	Sevilla	Hispanio.
72. Isabela Bouen Soriano	Sevilla	Hispanio.
73. María Luisa González Chacón	Sevilla	Hispanio.
74. Raquel Elvira Esteban Martín	Teruel	Hispanio.
75. Floreal Gabalda	La Norville	Francio.
76. Liba Gabalda	La Norville	Francio.
77. <i>Ne deziras aperi en listo.</i>		
78. Jie Chen		Çinio.
79. Raia Androvska	Sofía	Bulgaro.
80. María Elena Sánchez Vallés	Sevilla	Hispanio.
81. Marcos Ibáñez Gordillo	Sevilla	Hispanio.

82. Jesús Pérez Caballero	Caudete	Hispanio.
83. Ines Comabella Aguiló	Castellón	Hispanio.
84. Francisco Conejero Sánchez	Castellón	Hispanio.
85. Guillermo Molleda Jimena	Córdoba	Hispanio.
86. Bengt-arne Wickström	Berlín	Aŭstrio.
87. Anibal Ibáñez Gordillo	Sevilla	Hispanio.
88. Liya Maziy	Guardamar del Segura	Hispanio.
89. Néstor Guerra Castro	Sevilla	Hispanio.
90. Jordi Lietor López	Almería	Hispanio.
91. Manasse Bwanga Jean	Kinshasha	Dem. Resp. Kongo.
92. Henoc Kifumbi Ben	Kinshasha	Dem. Resp. Kongo.
93. Roger Mpiliki Ngamuanya	Kinshasha	Dem. Resp. Kongo.
94. Rodrigo Vaquera Márquez	Madrid	Hispanio.
95. Esperanza Vaquera Márquez	Madrid	Hispanio.
96. Matondo Makonko Abel	Kinshasha	Dem. Resp. Kongo.
97. Manuel Ramírez Cepeda	La Palma del Condado	Hispanio.
98. Kristin Tytgat	Antwerpen	Belgio.
99. Matej Pirih	Ljubljana	Slovenio.
100. Riccardo Lamperti	Milano	Italio.
101. Patrick Ongenyi Ngongo	Kinshasha	Dem. Resp. Kongo.
102. Michela Concialdi	Bolonia	Italio.
103. Maria Rosaria Spanò	Torino	Italio.
104. Antonio José Rodríguez Gálvez	Puente Genil	Hispanio.
105. Paulino Meliz Irache	Monzón	Hispanio.
106. Giovanni Cecilian	San Vendemmiano	Italio.
107. Rafael Blanco Arbe	Kaseda	Hispanio.
108. Antonio Justicia Guzmán	Huelma	Hispanio.
109. Joan Clos Rigual	Villafranca Penedès	Hispanio.
110. Aleksandra Lopatina	Moskvá	Rusio.
111. Jordi Perera Faura	Moià	Hispanio.
112. Dori Gromaz Armenteros	Barcelona	Hispanio.
113. Hamza Salam	Rawalpindi	Pakistano.
114. Toño del Barrio	Alcorcón	Hispanio.
115. Umer	Abha Khamis Mushayt	Saŭd-Arabio.
116. Mian Salam Shany	Rawalpindi	Pakistano.
117. Bilal Ahmed	Abu Dhabi	Un. Arabaj Emiratoj.
118. Ambreen Islam	Karachi	Pakistano.
119. Muhammad Basil Babar	Karachi	Pakistano.
120. Shagufta Salam	Rawalpindi	Pakistano.
121. Muhammad Babar Mughal	Karachi	Pakistano.
122. Peter Ebenau	Amsterdam	Nederlando.
123. Radojica Petrović	Čačak	Serbio.
124. Laura Brazzabeni		Italio.

125. Oscar Burgio	Mazara del Vallo	Italo.
126. Antonio Badia i Planes	Lleida/Lérida	Hispanio.
127. María Elvira Álvarez Iglesias	Vigo	Hispanio.
128. Concepción Pereira Lamelas	Vigo	Hispanio.
129. Albert Stalin Garrido	Valenzuela	Filipinoj.
130. Rida Ahmed	Lahore	Pakistano.
131. <i>Ne deziras aperi en listo.</i>		
132. Félix Sánchez Boquete	Brión	Hispanio.
133. <i>Ne deziras aperi en listo.</i>		
134. <i>Ne deziras aperi en listo.</i>		
135. <i>Ne deziras aperi en listo.</i>		
136. Francesc Inglada	Tarragona	Hispanio.
137. Sol Roca	Tarragona	Hispanio.
138. José M ^a González Spínola	Sevilla	Hispanio.
139. <i>Ne deziras aperi en listo.</i>		
140. Daniel Moreno Tinajero	Sevilla	Hispanio.
141. Carmen Cidoncha	Don Benito	Hispanio.
142. Josip Pleadin	Đurđevac	Kroatio.
143. Pablo Jorge Pinazo	Teruel	Hispanio.
144. Djoumiati Maoulida	Hahaya	Komoroj.
145. Duncan Charters		Usono.
146. A.Fabián Jiménez	Vélez-Málaga	Hispanio.
147. Manuel Ortega		Venezuelo.
148. <i>Ne deziras aperi en listo.</i>		
149. Mila Mezo	Bilbao	Hispanio.
150. <i>Ne deziras aperi en listo.</i>		



HISPANAJ KONGRESOJ DE ESPERANTO

N-ro	Jaro	Urbo	N-ro	Jaro	Urbo
1	1920	Barcelona	36	1976	El Ferrol
2	1921	Zaragoza	37	1977	Sabadell
3	1923	Valencia	38	1978	León
4	1924	Bilbao	39	1979	Gijón
5	1925	Córdoba	40	1980	Madrid
6	1926	Madrid	41	1981	Murcia
7	1928	Sevilla	42	1982	Málaga
8	1929	Oviedo	43	1983	Zaragoza
9	1932	Madrid	44	1984	Sevilla
10	1933	Santander	45	1985	Cartagena
11	1936	Barcelona	46	1986	Vigo
12	1951	Terrassa	47	1987	Madrid
13	1952	Valencia	48	1988	Valencia
14	1953	Bilbao	49	1989	Bilbao
15	1954	Zaragoza	50	1990	Sant Cugat del Valles
16	1955	Gijón	51	1991	La Laguna
17	1956	Barcelona	52	1992	Mérida
18	1957	Madrid	53	1994	Málaga
19	1958	Castellón de la Plana	54	1995	Salou
20	1959	Málaga	55	1996	Murcia
21	1960	Pontevedra	56	1997	Valencia
22	1961	Palma de Mallorca	57	1998	Valladolid
23	1962	Valladolid	58	1999	Castellón de la Plana
24	1963	Barcelona	59	2000	San Sebastián de los Reyes
25	1964	Valencia	60	2001	San Javier
26	1965	Palencia	61	2002	Alicante
27	1966	Bilbao	62	2003	Valencia
28	1967	Zaragoza	63	2004	Bilbao
29	1969	La Laguna	64	2005	Alcalá de Henares
30	1970	Mieres	65	2006	El Puig
31	1971	Alicante	66	2007	Palos de la Frontera
32	1972	Vigo	67	2008	Cuenca
33	1973	Madrid	68	2009	Málaga
34	1974	Valladolid	69	2010	Santiago de Compostela
35	1975	Lleida	70	2011	El Escorial

HISPANAJ KONGRESOJ DE ESPERANTO

N-ro	Jaro	Urbo	N-ro	Jaro	Urbo
71	2012	Almagro	76	2017	Teruel
72	2013	Zaragoza	77	2018	Madrid
73	2014	Ronda	78	2019	Málaga
74	2015	Cullera	79	2021	En interreto pro KOVIM-19
75	2016	Herrera del Duque	80	2022	Comillas

81-a Hispana Kongreso de Esperanto Sevilla 2023

En la komenco, la nomo de la unuaj kongresoj estis diversaj kaj ne ĉiam nomiĝis "hispanaj kongresoj". Ekzemple: la unua kongreso en Barcelono en la jaro 1920 oficiale estis la Unua Diskutanta Kunveno de Esperantistoj de Iberiaj Landoj -UDKEILO- .

En la jaro 1968 okazis en Madrido la Universala Kongreso de Esperanto, kaj en 1993 en Valencio.



Notoj

LA ESPERO

**En la mondon venis nova sento,
tra la mondo iras forta voko;
per flugiloj de facila vento
nun de loko flugu ĝi al loko.**

**Ne al glavo sangon soifanta
ĝi la homan tiras familion,
al la mond' eterne militanta
ĝi promesas sanktan harmonion.**

**Sub la sankta signo de l'espero
kolektiĝas pacaj batalantoj,
kaj rapide kreskas la afero
per laboro de la esperantoj.**

**Forte staras muroj de miljaroj
inter la popoloj dividitaj;
sed dissaltos la obstinaj baroj,
per la sankta amo disbatitaj.**

**Sur neŭtrala lingva fundamento,
komprenante unu la alian,
la popoloj faros en konsento
unu grandan rondon familian.**

**Nia diligenta kolegaro
en laboro paca ne laciĝos,
ĝis la bela sonĝo de l' homaro
per eterna ben' efektiviĝos.**